# EKO 2023

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

ilei — Nia aganto pri instruado kaj progreso

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

**EKO 2023 / 57. Oktobro 6, 2023**


**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Elda Doerfler, Gbeglo Koffi.**

**Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 430 KB. Sume: KB 470**

## La allogaĵoj de Aruŝa por UK 109

La gastigonta urbo Aruŝo estas internacia turisma celo, sed ne nur: ĝi estas ankaŭ grava diplomatia urbo, la sidejo de la Orient-Afrika Komunumo kaj de la Afrika Kortumo de Afrika Unio. La regiono de Aruŝo loĝigas pli ol du milionojn da homoj. Ĝi troviĝas je la orienta branĉo de la Granda Rift-valo sub modera klimato (SMG: 27 gradoj tutjare). La granda urbo estas proksima al la nacia parko Serengeti, la konservada areo Ngorongoro, la nacia parko Lago Manyara, la gorĝo Olduvai, la nacia parko Tarangire, la monto Kilimanĝaro kaj la monto Meru en la nacia parko Aruŝo mem.




Parolata lingvo en Tanzanio estas la svahila – pensebla kiel la Esperanto por kelkaj orient-afrikaj lando. Vidu la mapon, kiun sendis Nino Vessella. Do, landoj kie oni parolas la svahilan estas Ugando, Kenjo, Tanzanio, Ruando, Burundo kaj parto de Kongo DR.

## Facila vento blovadas

https://uea.facila.org/artikoloj/kongresoj-kaj-kunvenoj/enmigrado-la-kongresa-temo-r388/

https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/kiel-forman%C4%9Di-plaston-r389/

Jen du freŝaj tekstoj en <facila.org>, kiun prizorgas Anna Löwenstein.

## Madagaskara retradio en Esperanto

Jen la elsendo n-ro 134 de nia retradio Aminda Radio Esperanto el Malagasio. Ni proponas al vi la duan kaj lastan parton de la artikolo pri la frutempaj patriotoj

Menalamba. Kelkajn novaĵojn de la kuranta monato la redaktoro prezentas al vi. Krome, li respondos al la demando 'Kio fakte instigas min plu agadi en Esperantio?' por inspiri ĉiujn, kiuj klopodas disvastigi la zamenhofan lingvon en sia lando. Ni ne forgesis aldoni belan novan kanton de Kajto. Se plaĉas al vi la podkastoj de Aminda Radio Esperanto (ARE), bv finance apogi nin por plibonigi nian ilaron. Vi povas ĝiri monon en la UEA-konton <fidi-d> (kun la mencio ARE) aŭ en la Paypal-konton <henrielredtv@gmail.com>. Ni anticipe dankegas vin!
https://youtu.be/-J1mPPSjwVA

## Prelego en Kostariko

En la 29-a de septembro mi prelegis pri Esperanto ĉe la Kostarika Sociasekura Kaso, laŭ invito de la Programo Ora Civitano, kiu proponas kulturajn temojn por emeritoj. Jen la ligilo: https://fb.watch/nlG9afQt8z/

Antonio Leoni, Kostariko

## Junularo en Kongo DR

En tiu lando junaj esperantistoj volas reaktivigi sian movadon per sia asocio DKEJO. Ĉar ni estas junaj, ni intencas reaktivigi nian movadon organizante diversajn junularajn aktivadojn, el kiuj ni mencias la ekzemplon de kluboj, retaj renkontiĝoj por interŝanĝi kun aliaj gejunuloj en la tuta mondo, enspezigajn agadojn ktp.
Ni mem ne povas atingi tion sen sincera kunlaboro kun niaj Esperanto-asocioj en Afriko kaj en la tuta mondo. Ni petas la landan Esperanto-asocion en Kongo DR, la afrika komisiono de UEA, TEJO, ILEI kaj ajna alia Esperanto-organizo, subteni nian movadon morale, materiale kaj finance.
Ni junaj kongolandanoj ĝojos vidi nian movadon kreski kaj doni bonajn fruktojn.
Nia komitato konsistas el Hope Mboyo, Moses Byamungu (vicprezidanto kaj aganta prezidanto), Espoir Goma Kasati (sekretario), Natacha Hakizumwami (kultura konsilanto), Abel Matondo (kasisto) kaj Nickson Kasolene (Estrarano).

TEJO organizas virtualan eventon, Retoso. Por tiu evento ni kolektadas kontribuojn de junuloj el diversaj landoj. Ĉi-foje ni celas ricevi kontribuojn de junuloj el Esperanto-lernejoj. La kontribuoj povas temi pri artaĵo, muziko, prezento pri sia lernejo, aŭ iu ajna-tema prelego aŭ recitado de poemeto. Ĉu vi povas helpi aŭ meti nin en kontakto kun tiuj lernantoj aŭ peti la lernejestrojn sendi al ni kelkminutan mallongan videon faritan de tiuj junuloj pri diversaj temoj? Bonvole sendu la materialon al Espoir Kasati <espoirkasati@gmail.com>.

## Universitata diskutgrupo

En la 2-a de oktobro rete diskutis la nove fondita retgrupo pri universitata agado. Modestis la nombro de partoprenantoj (10) sed buntis la kolekto de landoj: Barato, Brazilo, Britio, Ĉinio, Germanio, Hungario, Hispanio, Irano kaj Italio/Britio.

Renato Corsetti prezidis la sesion; jen lia raporto pri ĝi:

> Michele Gazzola prezentis la revuon *Language Problems and Language Planning*, https://benjamins.com/catalog/lplp. La ĉefa mesaĝo: sendu altkvalitajn artikolojn pri politikaj kaj socilingvistikaj problemoj de kiu ajn lingvo en la mondo. la artikoloj aperas en naciaj lingvoj kun resumoj en esperanto kaj en aliaj du lingvoj. Poste oni parolis pri la studenta klubo en la universitato de Giridhar Rao, pri la provoj informi pri esperanto la studentojn de la universitato de Valencia. Poste Arko parolis

> pri la peto de Esperanto-kursoj fare de ĉinaj universitatoj kaj fine estis raportetoj pri sukcesaj varb-agadoj en germanaj kaj iranaj universitatoj.

La registraĵojn de la antaŭaj sesioj vi povas spekti en la jutuba kanalo de UEA: https://www.youtube.com/playlist?list=PLfebd4xxn3CMqTrpXMay2YVfrhDYT-Vm5

Ankaŭ trovebla en la retejo de la irana landa asocio, IrEA, prizorgita de la prezidanto de ILEI: https://www.espero.ir/eo/category/kunpensigado/

## Nova libro pri lingva politiko kaj planado

Ni ĝojas anonci la publikigon de la anglalingva Routledge Handbook of Language Policy and Planning (redaktita de Michele Gazzola, François Grin, Linda Cardinal, kaj Kathleen Heugh). Ĉi tiu manlibro traktas lingvo-politikon kiel publikan politikon, kiun oni povas studi per la ciklo de publikaj politikoj. Ĝi ofertas sisteman kaj esplor-informitan prezenton de la procezoj kaj metodoj de lingvo-politika programado, efektivigo kaj taksado. Kun granda enkonduko, 38 ĉapitroj kaj ampleksa bibliografio, ĉi tiu Manlibro estas rimedo por ĉiuj decidantoj, studentoj kaj esploristoj de lingvo-politiko kaj planado ene de lingvistiko kaj rilataj fakoj kiel publika politiko, ekonomio, politika scienco, sociologio kaj edukado. La Manlibro enhavas ĉapitron pri Esperanto kaj interlingvistiko. Ĉi tiu senpaga antaŭprezento enhavas la enhav-tabelon, la enkondukon, same kiel la referencojn. Varba kupono valida ĝis la 31-a de decembro permesas al via biblioteko aĉeti ekzempleron je rabatita prezo.

Michele Gazzola, Ulster University, www.michelegazzola.com

## Interparolo de du movadaj kolosoj

Claude Piron interparolas kun István Szerdahelyi en la Simpozio pri paco, okazinta en Zagrebo en 1986:

https://youtu.be/cg5F_eImox4

SMG: Szerdahelyi forpasis unu jaron pli poste en la jubilea jaro de Esperanto.

## Kursoj en Lillo kaj Zaragozo (LZ – memore al Ludoviko Zamenhof)

Kredeble Zamenhof ĝojus, ke ĉiujare okazas tra la mondo centoj da kursoj.

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis novaj eroj ĉe la Kursejo.

Gvidantonomo: Santiago López
Tipo: Nova kursgvidanto
Loko: Zaragoza, Hispanio

Aldoninto: santiago_zgz
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27575

Nomo: Kurso de la 60-a domo - Lillo
Gvidantonomo: Viktoro Simonnet (ankaŭ la aldoninto)
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Lillo, Francio.

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27576

## La tago de pliaĝuloj




Jen el komuniko de UEA omaĝe al tiu tago.

'Maljuniĝo de la tutmonda popolo estas neŝanĝebla tendenco, interalie pro gigantaj antaŭenpaŝoj de la medicina scienco. Plena respekto de homaj rajtoj inkludas specialan atenton al specifaj grupoj. Pro tio, en 2023, ni pripensas la universalajn homajn rajtojn por pliaĝuloj.'

La homaj rajtoj estas por la tuta vivo, sed necesas specialaj klopodoj en ĉiu vivperiodo. Registaroj devas konstrui intergeneraciajn modelojn por protekto de homaj rajtoj. Por konstrui tion, necesas alproksimigi generaciojn kaj aŭskulti ankaŭ la pliaĝulojn.

Kiam ni parolas pri interkompreniĝo kaj aŭskultado, lingvoj gravas. Multfoje, pliaĝuloj estas portantoj de lingvaj trezoroj, ĉu specifaj endanĝerigataj lingvoj, ĉu variaĵoj de naciaj lingvoj. Fakte, pliaĝuloj estas vivaj informiloj pri kulturaj kaj lingvaj ŝanĝoj.

Esperanto estas pontolingvo, ne nur en plej evidenta senco inter malsamlingvanoj, sed ankaŭ por la Esperanto-komunumo, inter malsamaj generacioj. Esperantujo proponas plurajn eblecojn al ĉiuj riĉigi sin je novaj scioj pri landoj, kulturoj, valoroj kaj vivkutimoj; je novaj amikoj ĉirkaŭ la mondo; je novaj eblecoj kunlabori en pluraj kampoj; je novaj okazoj vidi la mondon per nova kunlabora perspektivo – kaj je novaj aliroj por solvi la grandajn mondajn problemojn per kunagado inter ĉiuj popoloj kaj ĉiuj generacioj.

https://esperantoporun.org/wp-content/uploads/2023/10/Pliaguloj-Mesago-UEA-2023.pdf

SMG: Tiu tago gravas por nia movado, kie en ĉiu kontinento krom Afriko, nia komunumo konsistas ĉefe el pliaĝaj personoj.

## Mankis 'medio'

Korekto de la temo por la UK en Aruŝo: SMG ellasis la vorton 'medio'. Do, la ĝusta temo estas "Homo, lingvo, medio por pli bona mondo. Pardonpete.

======= vortoj: 1205 ========

**La kolekto de EKO por 2023:** https://www.ilei.info/agado/EKO.php (ĝis 50).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj.  Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.:

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.